

La sumo de la tuta ŝoveladenergio, kiu estas necesa por neĝliberigi la enirejon antaŭ la dompordo aŭ la aŭtomobilgaraĝo, ĉiam estas egala. Nur en la sekva okazo la “malseka” neĝo efektive estas pli peza ol la seka: nome kiam „nove falinta” neĝo estas ensorbinta la degelan akvon de la “malnova” neĝo. Tio signifas por la neĝŝovelisto duoblan fortostreĉon...

(2001-02-27)

### Duba rekordo

La plej granda ruboforigejo de la mondo troviĝas en « *Fresh Kills* » sur *Staten Island*, urboparto de Novjorko sur insulo antaŭ *Manhattan*. Ekde 1948 ĝi akceptas novjorkan rubon, kaj jam en la jaro 1950 oni konsideris fermi ĝin favore al unu el la aliaj 90 oficialaj rubaĵ-lokoj kaj forbrulig-maŝinaroj de la urbego.

Intertempe ĉiuj 90 instalaĵoj estas fermitaj – sed *Fresh Kills* daŭrigas sian laboron. La 13000 tunoj da rubo, kiujn la novjorkanoj ĉiun tagon produktas, estas transportataj al 100 ŝarĝ-kajoj kaj poste portataj per gigantaj pramŝipoj al *Staten Island*. La tiea rubejo kreskas jare per 3,5 milionoj da tunoj – maso, kiu estas proksimume la 76-obla maso de la luksŝipego “*Titanic*”. Kelkaj lokoj de *Fresh Kills* jam superas la alton de la Usona Liberecstatuo. Ŝtata permeso neniam ekzistis – sed la ruborenverso fakte en tiu ĉi jaro (almenaŭ oni tiel diras) eble estos fermota...

(2001-03-11/12)

### Pli estas malpli...

Kio igas abelidon fariĝi reĝino? Ĉio estas afero de la nutraĵo. Kiam la larvoj estas nutrataj per poleno kaj nektaro, ili disvolviĝas al “abelaj laboristinoj”. Se ili rajtas manĝi “reĝan ĝeleon” (nome la antaŭ-fermentitan abelreĝinan nutrosukon) ili poste fariĝos reĝinoj. Kiel oni nun estas malkovrinta, ekzistas sep genoj kiuj estas aktivigataj tut-diverse ĉe laboristinoj unuflanke kaj ĉe reĝino aliaflanke. Pro la mal-sama nutraĵo tiuj genoj estas en- aŭ elŝaltitaj.

Mirige, ke fakte la nefekundaj laboristinaĵoj posedas pli da enŝaltitaj genoj ol la abelreĝino: estas ĝuste tiaj genoj, kiuj stampas ilin laborbestetoj. Kaj ne kondamnas ilin al la diboĉa vivo de reĝino kun giganta virharemo kaj ovodeponado. Anstataŭe, ili rajtas esplori la belegan, buntfloran mondon – kaj aldone ricevas ŝikan polenan kalsoneton...

(2001-03-24/25)

(Fonto : Ĉiuj sciindaĵoj estas el *Brockhaus*-enciklopedia kalendaro « Kio ne troviĝas tiel en la leksikono ». Post la unuopaj teksteroj - enkrampe - la dato de la koncerna kalendarfolio)

### Pres-indikaĵoj

ISSN 0048-9557, Eldonanto: ISAE

Laserkopiita: Aŭgusto 2002

Responso redakta teamo

La estraro de ISAE

### Responso redaktanto por tiu ĉi kajero

R. Sachs (DE) – sa

Kunredaktanto

J. Kavka (CZ) – ka

Lingvaj kontrolantoj

O. Haszpra (HU) – ha, S. Schweiger (GE) – sc, J. Wozniczka (PL) – wo,  
N. Korjenevskaja (FR) – ko

### Eldonkvanto : 200

Adreslisto laŭ kotizoj ricevitaj antaŭ ekspedo

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la koncernaj aŭtoroj. Ili ankaŭ respondecas pri formo kaj formato, se ili mem kompostis.

### Redaktaj rimarkoj pri la artikoloj

- |                   |         |           |
|-------------------|---------|-----------|
| 1. Laŭdado        | komp sa | red sa/ka |
| 2. <i>Haszpra</i> | komp sa | red ha    |
| 3. <i>Stampa</i>  | komp sa | red sa    |
| 4. <i>Kavka</i>   | komp sa | red ka    |
| 5. <i>Lewin</i>   | komp sa | red sa/sc |
| 6. <i>Werner</i>  | komp sa | red sa/wo |
| 7. <i>Ubijko</i>  | komp sa | red ko    |
| 8. Scienca eĥo    | komp sa | red sa/ka |
- komp = kompostis; red = kontrolis kaj redaktis

Membrokotizo de ISAE : € 20.00/jare  
prefere al

Poŝtbanka konto n-ro 140 380-608 nome de ISAE-Sachs  
ĉe Postbank Frankfurt/Main, Germanio, Banka kodo 500 100 60  
aŭ al

ISAE-konto ĉe UEA/Rotterdam (NL) : isae-z

Nepre informu pri via pago (kaj kompleta adreso) la  
eldonanton:

Prof Dr R Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269-  
Eschwege/Germanio

Tel./Fakso xx49-(0)5651-331866; <IsaeSachs@aol.com>